

# 39-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO GIJON 16-21 Julio 1979



En Hispanio, la Kongresoj de Esperanto estas el du tipoj. Estas, unue, la modestaj, tritagaj kongresoj, ĝenerale okazantaj dum semajfino, aŭ profitante iun festotagon proksime al dimanĉo. En tiaj kongresoj malabundas la distraj, amuzaj, folkloraj kaj ekskursaj programeroj; en ili estas preskaŭ nur labor-sesioj, kiel eble plej limigitaj. Kadre de ili okazas la nepraj kunsidoj kiel la ĝenerala asembleo de HEF k.s. Krome estas ankaŭ la longaj kongresoj, kun daŭro je proksimume unu semajno. Ĉi lastaj havas ian karakteron sufiĉe turisman. Ne mankas en ili la laborsesioj, male, en ili la prelegoj, akademiaj aktoj kaj ĉiutipaj kunvenoj estas eĉ pli multenombraj ol en la tritagaj kongresoj, sed ĉefe abudas en ili la distraĵoj kaj spektakloj, bankedo, lunĉoj, tuttaga ekskurso… Laŭ tiu skemo, la 39a landa Kongreso, okazinta en Gijón de la 16a ĝis la 21a de julio 1979 apartenas al la dua grupo, al la turismaj kongresoj.




Sed komence ni devas rekoni ke ne ĉio estis brila en la disvolviĝo de la esperantista renkontiĝo, kvankam ĝenerale la rezulto estis bona. La problemo aperis jam en la unua kongrestago kiam kelkaj el la kongresanoj kiuj estis elektintaj gasti en la **Labora Universitato** abomenis pri tiu loko kaj oni devis serĉi por ili, aŭ trovis ili mem, aliajn pli komfortajn gastejojn. Verdire, ne estis bona ideo proponi tiun lokon kiel loĝejo.

Sed esceptante tion, ĉio cetera rezultis sufiĉe bona en la Kongreso organizita de la gijonaj esperantistoj. Laŭlonge de la lundo, 16an de julio, oni disdonadis la kongresan dokumentaron al la samideanoj kiuj prezentiĝis en la kongresejo. Entute estis 340 aliĝintoj tamen multaj el ili ne ĉeestis la Kongreson. Vespere de tiu tago, krom ekfunkciigi la libroservon de **HEF**, ankaŭ estis inaŭgurita la esperantista ekspozicio. La ricevitaj fotoj de esperantistaj grupoj en la mondo ne estis abundaj, do, por la ekspozicio, al tiu materialo estis aldonitaj publikigaĵoj en Esperanto, poŝtaj kovertoj de leteroj el ciuj landoj kaj poŝtkartoj interŝanĝitaj de geesperantistoj el la tuta mondo.

Je la 9a horo nokte okazis la "Interkona Vespero" en iu apudmara restoracio de la urbo. Partoprenis en tiu akto multaj gekongresanoj kaj estiĝis tie tre bona etoso.

Marde, la 17an de julio. Matene okazis la Solena Malfermo de la Kongreso en la teatr-salono de la kongresejo. Ĉeestis ĝin la Urbestro de Gijón, José Manuel Palacio, kaj aliaj provincaj aŭtoritatuloj. Santiago Mulas, Prezidanto de la Loka Organiza Komitato, esprimis sian bonvenon al ĉiuj kongresanoj, kaj rememorigis la forpasintajn asturajn samideanojn kiuj tiel elstare viglis en antaŭaj kongresoj. Poste salutis ankaŭ la reprezentantoj de la ĉeestantaj delegitaroj, kaj ankaŭ la eksterlandanoj: Angel Corral, el Argentino, S-ino Plamenka, el Bulgario, S-ro Fighiera, el Italio, S-ino Pieńkiewicz, el Pollando, S-ino Olga Almeida, el Portugalio, S-ino A. F. Sikorska kiel redaktorino de **HEROLDO de Esperanto**. Fine salutis ankaŭ la reprezentantoj de Fakaj Organizoj: **ILEI**, **HEFA**, **MEM, ILERA**… La plej longaj intervenoj estis tiuj de Ada Sikorska kaj de la peranto de **MEM (Mondpaca Esperantista Movado),** Feliciano Oliván Guiu. Fermis la akton iu interveno de S-ino Rafaela Urueña, Prezidantino de **Hispana Esperanto-Federacio**. Ŝi eksplikis la signifon de la esperantistaj kongresoj, la celon de la Internacia Lingvo. Lerte, ŝi prezentis tre instruan temon pri la aĝo de la lingvoj, kaj substrekis ke Esperanto kun siaj 92 jaroj estis nur bebo. Fine, per afablaj vortoj, la Delegito de la Ministrejo pri Kulturo S-ro Barraco, deklaris inaŭgurita la Kongreson.